


Programo de KKPS

Ven	Manĝejo	Salono	Dua domo
15:00	Akceptejo	Ornami	
18:00	Vespermanĝo		
19:30		Interkona vespero	
21:30	Trinkejo	Dancejo	Gufujo
Sat	Manĝejo	Salono	Dua domo
8:30	Matenmanĝo	9:20 Kurso komencantoj	
10:00	NEJ-membrokunsido	Prezento de BEMI	TEJO-
11:00	NEJ-estrarkunsido	Kurso progresantoj	trejnado
12:00	Tagmanĝo		
13:00	Ekskurso!		pri
16:00	Konsentite	Kurso pri desegnado	rajtbazita
17:00	Frontoludo	La mortolisto de UNITED	alio
18:00	Vespermanĝo		
20:00		Kunkantkoncerto	
21:00		Halovena balo	
22:00	Trinkejo	Diskejo kun DĴ Paul	Gufujo
Dim	Manĝejo	Salono	Dua domo
8:30	Matenmanĝo		
10:00	Mankantaj vortoj en Eo	Enkonduko pri Loĵbano	
11:00	Fotoj el Tajlando	Kaŝita mondo de	
11:30	PEKO 2019	dormo kaj spirado	
12:00	Tagmanĝo		
13:00		Historio de la perioda tabelo	
14:00	Purigado	Purigado	Purigado



Pos-Amiko

Aŭtuno 2018, Numero 26

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Poso ĉefkandidato
1. IJK-ĉefo kritikas TEJO-vicprezidanton
2. Kunigo de renkontiĝoj
2. TEJO volas vendi Pasportan Servon
2. Nova loko por FESTO 2019
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Poso ĉefkandidato por Eŭropa Komisiono

Je vendredo la 2-a de novembro, antaŭ granda publiko, Koko Poso anoncis sian kandidatiĝon por prezidanto de la Eŭropa Komisiono. Poso estos la tuteŭropa ĉefkandidato de la partio UEA, la Utila Eŭropa Alternativo. Ĝia varbslogano estas: 'igu Eŭropon verda denove'. Inter ĝiaj promesoj estas pli da mono por kokoj, forigo de ĝenaj etikaj reguloj, konstrui muron sude de Italujo, kaj eliri la Eŭropan Union.

IJK-ĉefo kritikas TEJO-vicprezidanton

En septembro ekestis malgranda kverelo inter la organiza teamo de la slovaka IJK kaj la estraro de TEJO. La problemo ekestis pro fuŝo en la serviloj de TEJO, pro kio dum iom da tempo ne haveblis la aliĝilo por la IJK. Poste Léon Kamenický, kunordiganto de la IJK-teamo, deklaris jene:

L: "Saluton, la aliĝilo refunkcias. Ni nur volas informi, ke la eraro ne okazis ĉe la flanko de la LKK, sed de TEJO-flanko."

Poste al tio reagis la vicprezidanto de TEJO, Léon Kamenický:

L: "La ĉefa informo de tio estas, ke oni laboras kaj zorgas pri problemoj. Mi kiel estrarano zorgos pri tio kaj faros ordon, por ke tiaj aferoj ne plu okazu. Ne serĉu skandalon malantaŭ laboro."

TEJO petis helpon de eksa estrarano de ĈEJ (Léon K.) kaj eksa estrarano de SKEJ (Léon K.) por solvi la konflikton.

Kunigo de renkontiĝoj: la nova modo?

La Verdaj Skoltoj ĵus ŝokis la movadon per anonco, ke ilia printempa renkontiĝo PEKO estos samloke kun la germana renkontiĝo PSI. Jam antaŭe KKPS kunokazis kun la Studsemajnfino de EN. Ĉu temas pri nova modo?

La Pos-Amiko sendis al diversaj organizantoj demandon, ĉu ili kunorganizus renkontiĝon:

IJF: "Almenaŭ dum la Itala Kongreso estus pli varme."

SES: "Nur kun malgranda renkontiĝo, kiel ekzemple la UK."

IJK: "IJK 2019 en Slovakio!"

RF: "Ni ĉiam poras kunigon de homoj en ĉiu maniero."

JES: "Ni jam estas kuniĝo, ĉu ne?"

NE: "Ne."

TEJO volas vendi Pasportan Servon

La financaj malfacilaĵoj ĉe UEA (kiu ĵus draste altigis la membrokotizojn) ankaŭ trafas la leĝe sendependan TEJO-n. Por plibonigi la kasrezervojn kaj koncentriĝi pri kernaj aktivaĵoj la asocio volas nun vendi nekernajn partojn de la organizo. Laŭ fontoj de la Pos-Amiko jam estas progresintaj negocoj pri la vendo de Pasporta Servo, kun ĝia tuta adresaro, al la aŭstralia firmo Amikumu. Al demando, ĉu tia transdono de datumoj ne kontraŭus la Ĝeneralan Datum-Protektan Regularon de la EU, TEJO-estrarano respondis: "Ni ankoraŭ atendas tradukadon de tiu regularo al Esperanto, poste ni aplikos ĝin."

Nova loko por FESTO 2019

Post la tria malsukceso rezervi lokon kaj daton por la venonta FESTO, la teamo nun finfine anoncis lokon por la muzikfestivalo. La renkontiĝo okazos en la ĝardeno de la patro de Valère Doumont. Avantaĝo de la loko estas bona kontakto kun la posedanto kaj antaŭa sperto; malavantaĝo estas la malpli granda spaco. La organiza teamo petos konsilojn de la pluramema komunumo por dormigi pli da homoj en ĉiu lito.

Volontuloj serĉataj por scienca eksperimento

Esploristo de la Akademio Internacia de Sciencoj en Sanmarino faras esploron pri la sonoj faritaj de bovoj. La studo koncentriĝos pri grupoj de bovinoj de diversaj grandecoj. Interesiĝantoj povas sin anonci ĉe D-ro B. Vino je sabato 20:00.

NEJ-Novaĵoj!

NEJ konsideras kandidatiĝon por IJK 2020

Post la preskaŭ sukcesa kandidatiĝo por la Internacia Junulara Kongreso 2019 ni supozis, ke en 2020 okazos IJK en Nordameriko. Sed daŭre ne venas mesaĝo, ke en Usono aŭ Kanado kreiĝas bona teamo, do eble jam en 2020 okazos la nederlanda IJK. Se NEJ kandidatiĝos, la loko denove estus la gastejo De Hoof en Someren, kiu ofertas lokon por ĝis 400 homoj. La sama organizo teamo kiel por 2019 daŭre haveblas.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ĉarma fremdulo kontrolos vian busbileton.

Taŭro: Vi verkos poemon por deklami dum membroasembleo.

Ĝemeloj: Via ideo pri fritita jogurto ankoraŭ ne populariĝos.

Kankro: Ne forgesu kombi viajn brovojn.

Leono: Vi forgesis aĉeti donacon por la naskiĝtago de Esperanto.

Virgulino: Post varma vino vi ne plu estos.

Pesilo: Vi forgesis ŝanĝi horon kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi malkovras, ke pli plaĉas kostumo ol kosto.

Stela: Vi ricevos kritikon pri via kritiko.

Sagitario: Kunportu propran dormĉambron por esti certa pri komforto.

Kaprikorno: Sovaĝa nuboj atakos vin.

Akvisto: Simple montri vian vizaĝon ne sufiĉas por la premio de plej timiga kostumo.

Fiŝoj: Vi aĉetos aerodinamikan poŝtelefonon por pli rapide tekstumi.

NEJ ekhavas instruistojn

En marto kaj oktobro de 2018 NEJ sendis staĝanton al la Studsemajnfino de Esperanto Nederland. Tiuj staĝantoj flanke de spertaj instruistoj kungvidis Esperanto-kursojn, tiel gajnante utilan sperton. La rezulto estos jam videbla dum tiu ĉi KKPS, en la kurso por komencantoj, sed certe ĝi ankaŭ utilos en multaj aliaj okazoj.

Ludotago en Schiedam

Je sabato la 29-a de septembro diversaj NEJ-anoj kunvenis en Schiedam por NEJ-ludotago. Tradicie okazis diversaj ludoj, kaj la tago finiĝis per varma pico.

Nova estraro de NEJ 2018/19:

(bonvolu mem plenigi poste)

-
-
-
-
-